INFORMILO Nro 1.

XXIa Mondkongreso de Katolikaj Esperantistoj.

5-10 AŬGUSTO - ANTVERPENO (BELGUJO) - 1939.

La XXIa **Kongreso** de I. K. U. E. (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) kiu ĉijare okazos en Antverpeno (Belgio) tuj post la Universala Kongreso en Bern, estos unu el la plej brilaj IKUE-kongresoj. Ĝi estos brila ne nur pro la fakto ke ĝi estos oficiale malfermata de Lia Eminenco Kardinalo van Roey, Primato de Belgio, kiu ankaŭ en la solena malferma Meso pontifike asistos, sed ankaŭ brila pro la multnombra partoprenantaro.

Honora Komitato.

En la honora komitato, de kiu Lia Eminenco Kard. van Roey estas prezidanto, sidas Monsinjoro Micara, Apostola Nuncio en Belgio, ĉiuj Episkopoj de Belgio kaj plue multaj altranguloj el la politika kaj kultura vivoj.

Kongresejo.

Ĉiuj kunvenoj okazos en la fama konstruaĵo « Concordia ».

Kongresgazeto.

La oficiala kongresgazeto estas Flandra Katoliko, kiu enhavos ilustraĵojn kaj ĉiajn informojn utilajn kaj kiu estos sendata al la kongresontoj ekde Majo.

Kongrestemoj.

La ĉeftemo pritraktota kaj internacie priparolota estas : la katolika laborista junularmovado, ĝia esenco, evoluo kaj labormetodo.
Aliaj temoj estas pripensataj. Krom tio la kongreso pritraktos multajn problemojn koncerne la katolikan Esperantomovadon.

Fakkunsidoj.

Por la unua fojo okazos dum IKUE-kongreso fakkunsidoj. Provizore oni preparas du apartajn kunsidojn por la sacerdotoj, monaĥoj kaj seminariistoj, kaj unu por la gemembroj de ligoj de Katolika Agado. Proponojn por tiuj aŭ aliaj fakkunsidoj oni sendu al **Patro C. van Hoogstraten, Grimbergen (B.)**

Manĝoj.

Oni povas tre malmultekoste tag- kaj vespermanĝi en la konata « Restoracio Van Dijck », la hejmo de katolikaj unuiĝoj. Prezoj : tagmanĝo : fr. 6.75 (dimanĉe 7.50) vespermanĝo : fr. 5.50. Oni povas aldonigi antaŭ- inter- aŭ postmanĝaĵon por 3 fr.

Por la diversaj trinkaĵoj oni pagas en Belgio nur 1, 1.25 aŭ 1.50 fr.

Ekskursoj.

Provizore oni preparas jenajn ekskursojn : 1) boatveturadon sur la Skeldo ; 2) duontagan ekskurson al la egе vidindaj urboj Brugge kaj Gent ; 3) ekskurson al la vidindaj urboj Lier kaj Leuven, kun vizito de la antikva Norbertana Abatejo de Park ; 4) tutatagan postkongresan ekskurson al la Ekspozicio de Luik kaj la famaj grotoj de Remouchamps.

Afiŝoj kaj glumarkoj.

Belaj trikoloraj afiŝoj estas eldonitaj kaj senpage haveblaj por tiuj kiuj povas elpendigi ilin en publikaj lokoj. La trikoloraj glumarkoj kostas : por 50 : fr. 5 ; por 100 : 9. La koloroj de la afiŝoj kaj [illegible] estas la flandraj kaj Esperanta koloroj.

Kongreskotizoj.

Kompleta kongreskarto kostas ĝis la fino de Aprilo 40 fr., poste 60 fr. Unutaga karto ĝis 30-IV. 15 fr., poste 20 fr. Dutaga karto ĝis 30-IV. 20 fr., poste 30 fr.

Edzinoj de partoprenantoj, gejunuloj malpli ol 19 jaraj kaj blinduloj kun siaj gvidantoj pagas la duonon.

Senlaboruloj nur devas pagi 4 frankojn por la bela ilustrita kaj riĉenhava kongreslibro, se ili alsendas ateston pri sia senlaboreco subskribitan de sia parohestro aŭ konsulo de IKUE.

Adresoj.

Por ĉiuj informoj, mendoj de afiŝoj kaj glumarkoj turnu vin al la kongressekretariejo : Potgieterstraat 1, Antverpeno.

Por *ĉiuj* pagoj la adreso estas : XXIa Kongreso de IKUE, Erembodegemstraat 29, Aalst, Belgio. Poŝtĉekkonto no 415.470.

Notu 5 fr. = 1 Belga.

Helpkaso.

La LKK akceptas danke donacojn por ebligi la partoprenadon al senlaboruloj kaj malriĉuloj.

NE PROKRASTU SENDI VIAN KOTIZON!

N. B. — La kongresontoj kiuj volas antaŭe iom ekkoni la flandran popolon legu la tipan flandran verketon « Kristnaska Triptiko », de la fama flandra verkisto F. Timmermans. Pagante vian kotizon oni aldonu por tio 6 fr. kaj oni tuj ricevos ĝin.

Kongreslibro.

La kongreslibro estos valora libro, kun multaj ilustraĵoj, informoj ktp.

Fervoja Rabato.

La kongresanoj ricevos, samtempe kun sia kongreskarto, rajtigilon por rabato de 35 % ĉe la belgaj fervojoj.

Pri la rabato ĉe la eksterlandaj fervojoj ni poste informos. La estraroj de la landaj ligoj de IKUE bonvolu prizorgi tion en sia propra lando.

Por la partoprenantoj el Britujo kaj Irlando ni provas akiri rabaton ĉe la ŝipasocio Ostende-Dover.

Kongresgazeto.

La kongresanoj rajtas ricevi en la ilustritan kongresgazeton « Flandra Katoliko » senpagan anoncon de ne pli ol 20 vortoj.

Loĝado.

Sinjoroj povas loĝi en « Home St. Joseph », Van Schoonhovenstraat je jenaj prezoj por tranoktado kun matenmanĝo: 7 - 10 - 11 fr.

Ankaŭ en « Katholiek Internaat » Lom-str. 30, por jenaj prezoj: tranoktado kun matenmanĝo, la unuan tagon 10 + 3 fr., la aliajn tagojn 7 + 3 fr.

Virinoj kaj sacerdotoj en « Home Marie-José » je jenaj prezoj: tranoktado kun matenmanĝo, la unuan tagon 10 + 3 fr., la sekvantajn tagojn 7 + 3 fr.

Hejmveno en tiuj institutoj plej laste je la 10 ½ h, escepte en la tagoj de komunaj festoj kaj post la ekskurso al Brugo.

Ankaŭ en « Handelshoogeschool voor Juffrouwen » (Komerca Altlernejo por fraŭlinoj) Korte Nieuwstraat 37, ĉiaj personoj povas loĝi (sinjorinoj kaj sinjoroj). Ni rekomendas tiun instituton, ĉar ĝi situas fronte al la Restoracio Van Dijck. (Vidu Informilon N-ron 1, ĉe « Manĝoj ».) Prezo por tranoktado (sen matenmanĝo) 10fr.

La loĝantoj en la institutoj kunportu viŝtukon, sapon kaj kombilon.

Antaŭpago estas postulata en tiuj institutoj.

Hotelprezoj:

En hotelo de tria kategorio, loĝo kun matenmanĝo: fr. 24.–; duona pensiono: fr. 35,20; kompleta pensiono: fr. 52,80; en hotelo de dua kategorio tiuj prezoj estas respektive: fr. 42.–, 65,– kaj 84.–; en hotelo de unua kategorio respektive: fr. 52.–, 75,– kaj 100.

Ni priatentigas niajn gekongresontojn, ke ni nur povas garantii la loĝadon je antaŭpago al la LKK antaŭ la 1a de julio, kaj *ĉe frua aliĝo por tiuj kiuj volas loĝi en institutoj, pro la limigita loko.*

Oni klare difinu en la paĝilo kion oni deziras. La loĝad-okaso en Antverpeno tamen estas granda kaj la antaŭpago nur celas la rezervon de la ĉambroj, tiel ke oni post alveno en Antverpeno trovos ĉion preta.

Manĝoj.

Estas eble preni la manĝojn en la kongresejo mem je tre malaltaj prezoj. En la restoracio de Concordia estas loko por 400 personoj. Prezo por kompleta tagmanĝo (antaŭmanĝo, supo, legomoj kun viando kaj legomoj, postmanĝo): 8 fr., sen trinkaĵo kaj trinkmono.

Gvidado.

Dum sabato kaj la antaŭtagmezo de dimanĉo en la stacidomoj de Antverpeno estos skoltoj kiuj bonvenigos la kongresanojn kaj montros al ili la vojon al la kongresejo, laŭeble akompanante ilin.

Jenaj ekskursoj okazos: 1) boatveturado sur la Skeldo; 2) duontaga ekskurso al la ege vidindaj urboj Brugo kaj Gent; 3) duontaga ekskurso al la belaj urboj Lier kaj Leuven, kun vizito de la antikva Norbertana Abatejo de Park; 4) tuttaga postkongresa ekskurso al la Ekspozicio de Luik kaj la famaj grotoj de Remouchamps. Prezo de ekskurso 2 = 40 fr.; de ekskurso 3 = 20 fr. – Ambaŭ per aŭtobuso.

Okaze de la ekskurso al Brugge oni povas ĉeesti vespere la faman Ludon de la Sankta Sango. Sed atentu: tiuj kiuj volas ĉeesti tion, anoncu sin tuj, por ke ni povu rezervi lokon kaj mendi la bileton.

Filmado.

Verŝajne la kongreso estos parte filmata. Se vi volas vidi kiel vi mem moviĝas, venu al nia XXIa mondkongreso!

Tramvoja Rabato.

Kartoj je rabatita prezo por la tramoj estas haveblaj por jenaj prezoj: por 20 vojaĝoj (2 sekcioj): 13 fr. Por 20 vojaĝoj laŭ tuta trajekto de unu tramo: 19 fr.

Tiuj kartoj estas haveblaj ĉe la konduktoroj mem.

Kinejoj.

Por la semajno de la kongreso ni publikigos la liston de la katolika filmcenzuro de la kinoj, kie niaj kongresanoj povos vidi bonajn filmojn. Teatroj en tiu sezono kompreneble ne funkcias.

Juĝopovo.

La sacerdotoj kiuj havas juĝopovon en sia propra dioceso, havos ĝin ankaŭ dum la Kongreso en Antverpeno.

Kiel aliĝi?

Aliĝante vi bonvolu samtempe indiki sur la paĝilo aŭ poŝtkarto: 1) kie vi deziras loĝi, en instituto aŭ en hotelo (indikante la klason de la hotelo); 2) al kiuj ekskursoj vi verŝajne partoprenos. Konante la dezirojn de la kongresanoj la LKK povas prepari ĉion ekzakte. La gemembroj de ligoj de Katolika Agado ne forgesu indiki sian membrecon, skribante post sia nomo inter krampoj la literojn: (K.A.). Memoru tion!

Helpkaso.

La LKK akceptas danke donacojn por ebligi la partoprenadon al senlaboruloj kaj malriĉuloj. Tiuj kiuj mem ne povos partopreni pro manko de tempo bonvolu fari donacon, por ke aliaj povu partopreni en ilia loko.

Adresoj.

Por ĉiuj informoj kaj mendoj de aliĝoj turnu vin al la kongressekretariejo: **Potgieterstraat 1, Antverpeno.**

Por ĉiuj pagoj la adreso estas: XXIa Kongreso de IKUE, Erembodegemstr. 29, Aalst, Belgio. P-konto No 415.470.